



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Kodaj Nomoj

Gvidos: Fransoazo Oazo, Milan Kolka

Kodaj nomoj (angle Code Names, ĉeĥe Křycí jména) estas ĉeĥa tabla vortludo de Vlaada Chvatil. La ludo estas monde populara, ĝi jam estis eldonita en 30 lingvoj, ne nur eŭropaj. Ĉar dum pandemio ne eblas ludi en ludklubejoj, eldonisto de la ludo lanĉis retan version de la ludo. Nia klubo tradukis la retejon kaj vortojn.

Ni trovis, ke en Fracujo estas esperantista grupo, kiu ludas Kodajn Nomojn rete. Ni estas feliĉaj, ke nia laboro estas utila kaj la ludo estas ludata. Feliĉe ni ankaŭ trovis, ke la francoj ludas en la sama tempo, kiam okazas renkontiĝo de nia klubo.

Tial tiu ĉi reta renkontiĝo estos vere internacia, ni kunigos al grupo de Fransoazo Oazo.

Detaloj pri tiu aranĝo vi vidos en evento de ĉeforganizanto: <https://eventaservo.org/e/89f152>

Ligilo al ZOOM-sesio: <https://us02web.zoom.us/j/7355441963?pwd=NIZjQ01OazBSWUN4RjE0ZE1nMlpNQTO9>

Se vi ankoraŭ ne scias, kiel ludi la ludon, spektu registraĵon ĉe Jutubo: <https://youtu.be/yYi2IGC62zw>

Regulojn en la ĉeĥa vi povas legi ĉe <https://czechgames.com/files/rules/codenames-rules-cz.pdf>

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 26-an de Oktobro 2021 je la 18-a h.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Zoom

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskutilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebila komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.



Ni rekomendas

- En Jutubo aperis nova [kanalo de Esperanto-klubo Prago](#)
- [Opero Sternenhoch en Nacia teatro en Prago](#). La operon komponis Ivan Acher. Ĝi estas kantata en Esperanto. Tradukis Miroslav Malovec. La opero estos prezentata la 31-an de Oktobro, la 30-an de Novembro, la 15-an kaj la 16-an de Decembro 2021.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĒDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Programo en Novembro 2021

La 2-an **Kiel oni verku vortarojn** – Miroslav Malovec, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno (plej proksimaj tramhaltejoj Hybešova kaj Václavská, linioj 1 kaj 2)

La 9-an **Renormaligado per miaj okuloj**. Rememoroj, diskuto. Rete. Mi petas vin, ke vi preparu viajn rakontojn.

La 16-an **Julius Payer (1842 – 1915) kaj unusola aŭstro-hungara kolonio** – Oldřich Arnošt Fischer, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno

La 23-an *Ankoraŭ ne fiksita*, rete. Mi petas vin, ke vi proponu programon

La 30-an **Amuzu kaj lernu** – Josef Vojáček, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno



Novajoj en nia retbutiko

En nia reta butiko ĉe <https://butiko.esperantobrna.cz/2-domu> danke al eldonejo [Kava-Pech](#) kaj Gabriela Kopcová estas aĉeteblaj novaj libroj. Vi povas aĉeti [Kosmofabeloj](#) de Gabriela Kopcová en mastra traduko de Miroslav Malovec kaj fabelon [Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul](#) de Eva Vychodilová en traduko de Petr Chrdle.. Ambaŭ estas haveblaj ankaŭ en la ĉeĥa originalo.

Ni ankaŭ havas libron por knaboj [Arne, syn náčelníka](#). Tiu ĉi libro estis origine verkita en Esperanto de Leif Nordenstern, ĉeĥigis ĝin Oldřich Arnošt Fischer.

Por lernantoj de Esperanto ni havas lernolibrojn kaj vortarojn (baldaŭ en stoko estos ankaŭ esperanta-ĉeĥa vortato).

Printempe Oldřich Arnošt Fischer eldonis sian novan fotolibron kun titolo [El Mirinda Mondo de Dipteroj](#). Liaj fotolibroj pri naturo apartenas al la plej bone vendataj libroj en libroservo UEA.

Ni liveras nur en Ĉeĥion. Antaŭmenditajn librojn ni povas transdoni al vi en la klubejo aŭ en centro de Brno. Brnanoj, kaptu okazon kaj aĉetu por si mem aŭ viaj karuloj kristnaskajn donacojn kaj ŝparu sendokostojn!



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvānek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servu (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](#) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servu považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a některé on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto